

EKO 2025

Bleko
kun eĥo

EKO 2025-13. Marto 26. Pezo: Word 40, PDF 260 KB, Sen alĉroĉaĵo: Sume 300 KB

UK en Brno – aliĝprezo altiĝas fine de marto!

Al la Kongreso aliĝis ĝis la 26-a de marto 834 personoj el 59 landoj. Elstaraj landoj estas Ĉeĥio 90, Germanio 92, Pollando 77, Francio 71, Ĉinio 33, Hungario 31, Brazilo 28, Hispanio 26, Belgio kaj Italio, po 24, Nederlando 22 kaj Slovakio 20.



Franca kongreso en Nantes

Bonvenon en la retejo de la **Interasocia kongreso de**

Esperanto en Francio 2025! <https://kongreso2025.esperanto-france.org/?lang=eo>

Ĝi okazos en Nantes de la 7-a ĝis la 9-a de junio. La temo estas pri la **vojaĝoj**, kaj ni proponos interalie trovi *Jules Verne*, kiu estis aktiva subtenanto de Esperanto, kaj sekvi la paŝojn de Lucien Péraire, kiu travojaĝis la mondon bicikle inter la jaroj 1928-1932 dank' al Esperanto. Vi povos ankaŭ sperti "[le Voyage à Nantes](#)" (la vojaĝo en Nanto en Esperanta versio) kun eksterordinaraj maŝinoj kaj nuntempaj artaĵoj. Via restado povos komenciĝi per ekskurso ĉe la bordo de Atlantiko kaj daŭri per vizito de la kasteloj ĉe la rivero Luar'.

Universitata kurso en Ĉinio

La 3-an de marto oficiale komenciĝis la nedeviga kurso de Esperanto en la Pekina Lingva kaj Kultura Universitato: sin anoncis al la kurso 30 studentoj. Chen Ji, ĝenerala sekretario de Ĉina Esperanto-Ligo (ĈEL) respondecas kiel la ĉefa instruisto.

Jen la detalaj informoj:

中国网 : http://esperanto.china.org.cn/2025-03/12/content_117760236.htm

中国报道 : http://espero.chinareports.org.cn/2025-03/12/content_117760247.htm

Chen Ji, Ĝenerala Sekretario de la Ĉina Esperanto-Ligo

Impona BET en preparo

Je la 12-a de marto al la 59-aj Baltiaj Esperanto-Tagoj (BET-59), kiuj okazos la 5-a kaj 13-a de julio en Kaŭno (Litovio), aliĝis 200 personoj el 26 landoj; plej multe el Litovio (64 aliĝintoj) kaj Pollando (26). Legu la laŭlandan statistikon en <https://sezonoj.ru/2025/03/bet-180/> kaj (se vi ankoraŭ ne aliĝis) iĝu la 201-a aliĝinto.

István Ertl prelegos pri la spertoj de tradukisto. Legu pli en la novaĵretejo *La Ondo de Esperanto* <https://sezonoj.ru/2025/03/bet-181/> kaj aliĝu al BET-59.

Pola Radio pri Chopin

En la kulturkronikaj aktualaĵoj ni informas pri la finiĝinta pola Chopin-konkurso, kiu ebligas al laŭreatoj i.a. partopreni la Internacian Chopin-konkurson 2025; pri la 100-jariĝo de Pola Radio kaj porokaza ekspozicio en la varsovia Teknika Muzeo; pri la ensemblo Śląsk, kiu estas la reprezentanto de Pollando dum ĝia prezidanteco en la Eŭropa Unio.



Harry Harrison en memoro

Antaŭ cent jaroj, la 12-an de marto 1925, naskiĝis Harry Harrison, usona sciencfikcia verkisto kaj esperantisto, enplektinta Esperanton en siajn verkojn, precipe en la verko *Rustimuna Ŝtalrato*. Legu pli pri Harry Harrison en la novaĵretejo *La Ondo de Esperanto* <https://sezonoj.ru/2025/03/harrison-2/> kaj elŝutu senpage la Esperantan tradukon de lia populara romano *Naskiĝo de la Rustimuna Ŝtalrato* ĉe <https://esperanto-ondo.ru/Libro/Libro.php>

Homo Ludens

Eble ludoj ne estas la plej efikaj manieroj por lerni vortojn, sed ili sendube estas amuzaj lerno-metodoj. Ni jam diskutis pri samopiniuloj: <https://samopiniuloj.esperanto-jeunes.org>, en kiu la celo estas provi diveni kiujn vortojn la plimulto asocia al la taga vorto.

Estas kelkaj ludoj, en kiuj oni devas diveni vorton de la tago kiel en la ludo [mastermind]:

<https://esperanto.cat/wordleo/>

<https://vortjo.net/>

<https://greggink.com/cgi-bin/vortlo/vortlo> (senlima)

Estas ludo *intervorto*, en kiu oni devas diveni vorton eksciante kiom proksima ĝi estas al la provitaj vortoj: <https://haleyhalcyon.gitlab.io/intervorto/>

Estas kelkaj pendumiloj:

<https://krucenigmoj.tripod.com/pendumito.htm>

<http://www.majstro.com/Web/Majstro/games/hangman.php?gebrTaal=epo>

<https://jatek.eszperantostart.hu/akasztofa> (la retejo estas hungara, sed oni ludas per Esperantaj vortoj).

Gergely el Hungario

LPLP portas artikolojn en tri lingvoj

Mi atentigas vin pri la nova tema numero de LPLP : "[Ĉu lingvaj rajtoj ekzistas?](#)" Ĉiuj artikoloj havas resumojn en Esperanto.

Les droits fondamentaux linguistiques existent-ils?

Do Linguistic Human Rights Exist?

Special issue of Language Problems and Language Planning 48:2 (2024)

Editor Laure Clément-Wilz | Université Paris-Est Créteil
[Language Problems and Language Planning, 48:2] 2024. v, 101 pp.

Michele Gazzola

Nordiaj novaĵoj el Norvegio

Alvenis al EKO la fizike presita numero 2024/4 de *Norvega Esperantisto*. Ĝi raportas pri la unua finna video pri Aleksis Kivi, kiu verkis la romanon *Sep fratoj*. El la tri artikoloj menciitaj kovrilpaĝe, neniuj rilatas al Norvegio! Tio atestas la nordian aliron al la enhavo. La tria ero temas pri la korea verkistino Han Kong. Intertempe alvenis numero 2025/1 de la revueto.

Jegorovas je sepdeka festado

Antaŭ sepdek jaroj, la 11-an de marto 1955, en litova kamparana familio naskiĝis **Povilas Jegorovas**, unu el la plej aktivaj esperantistoj en la mondo. Legu pli en la novaĵretejo *La Ondo de Esperanto* <https://sezonoj.ru/2025/03/jegorovas/>.

Per flugiloj de facila vento

Jen interesaj artikoloj en la retejo <uea.facila>:

<https://uea.facila.org/artikoloj/opinioj/esperanto-kiel-ponto-inter-kulturoj-r458/>

<https://uea.facila.org/artikoloj/homoj/mortis-hungara-verkisto-istv%C3%A1n-nemere-r459/>

<https://uea.facila.org/artikoloj/%C4%9Denerale/esperanto-kaj-la-movado-de-nova-kulturo-en-%C4%89inio-r460/>

<https://uea.facila.org/artikoloj/opinioj/referendumo-%C4%89u-demokratia-ilo-r464/>

<https://uea.facila.org/artikoloj/movado/virina-agado-%C4%89e-uea-r467/>

Israelanoj vizitas bahaian ĝardenon

ELI invitas por komuna du-hora vizito de la Bahaaj Ĝardenoj en Haifa, inkluzive de akcepto kaj renkontiĝo kun eksterlandaj e-istoj. Ĝi estas planita por lundo, la 7-a de aprilo. Poste ni ekskursos tra antikva Akko.

Amri Wandel

Kunpens(ig)ado pri Esperanto en Universitatoj

Ni bonvenigas partoprenadon de ĉiuj interesatoj en la 59-a sesio, kiu okazos:

lunde, la 7-an de aprilo 2025, je la 13:30 laŭ UTC (Vi povas ĉiam ekscii la UTC-horon en la Esperanta retejo: <https://time.is/eo/UTC>).

Jen la ĉiama Zoom-ligilo por partopreni en la kunsidoj de Kunpens(ig)ado pri Esperanto en Universitatoj: <https://us02web.zoom.us/j/84502260578>

Nur se demandite: Kunven-Identigilo: 845 0226 0578.

Pasvorto: la nomo de nia komuna lingvo per minuskloj

Kun gvidado de Alessandra Madella kaj helpo de Viko kaj Ahmad Reza Mamduhi. Venu por diskuti kaj vidi kion ni povas plenumi por pli efike vigligi Esperanton en la universitatoj tra la tuta mondo!

Registraĵoj de antaŭaj sesioj: <https://www.youtube.com/playlist?list=PLfebd4xxn3CMqTrpXMay2YVfrhDYT-Vm5>.

SMG pledas refoje!

Bonvolu skribi al mi por EKO aŭ ajncele per minimume 12-punktaj literoj – la normo por EKO-komunikoj. Pli etaj literoj devigas temporaban luktadon per lupeo. Antaŭdankon pro via kunlaboro.

Lo Jacomo luktas por nia sankta afero

Jen nia aktiva batalanto bildigita dum sia vizito al Burundo. Paca batalanto evidente.



Brazila muziko

Jen frua muzikaĵo de la bando **Secos & Molhados**, tradukita de **Flávio Fonseca**, kaj titolita [Flores astrais](#). Ĝia originala titolo estas *Flores astrais*. Kun video!



Revuo el Kongo DR

Mi ĝojas prezenti al vi la 4-an numeron de Konga Stelo (revuo de la junularo en Kongo DR); vi povas trovi ĝin kune kun la aliaj tri antaŭaj numeroj en la retejo:

https://uea.org/vikio/Konga_Stelo_Revuo.

Kun afabla peto diskonigi tiun ligilon al viaj amikoj,

Joel Muhire, la redaktoro.

===== vortoj: 935 =====

Kunlaborantoj: Rob Moerbeek (NL), Elda Doerfler (IT), Frank Lappe (DE)



La Komuniko iras al la Landaj kaj Fakaj Asocioj, al la Komitato de UEA, pluraj instancoj de ILEI, al la Estraro de TEJO, al unuopuloj, kiuj petis la ricevon kaj la anoj de pluraj pasintaj AMO-

seminarioj. Entute ĉ. 2800 ricevantoj

Ĉi tiu komuniko estas disponebla laŭ la permesilo Krea Komunaĵo Atribuite Samkondiĉe 4.0 Tutmonde. Por pli da informoj vidu ĉe: <https://creativecommons.org/licenses/by-sa/4.0/>.

Aperintaj komunikoj legeblaj kaj elŝuteblaj ĉe: <https://www.ilei.info/agado/EKO.php>

La kvardek kvar numeroj de 2024 nun aperas tie, kune kun la kolekto el 2023

ALDONU Aŭ SUBTRAHU VIN: Skribu al <stefan.macgill@ce>gmail.com>. Por forigo, laŭeble informu min al kiu ekspedo-grupo vi apartenas. Mi povas forigi nur personojn kies retadreso estas individue enskribitaj. Ne eblas forigi homojn, kiuj ricevas la komunikojn pere de retlisto.